

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Simpla : 10 fkoj
Bonfara : 15 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes
P.Ĉ.K Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

MARTO - APRILO

1970 2

KULTURAJ KAJEROJ

1970 MARTO - APRILO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 13, boulevard de la Chauvinière
44 - Nantes

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

Ni respektu la Naturon

Esperanto tra la Mondo A. Frangeul

Sekreta vivo de la papilioj S.G.

Pupoj Komencis paroli Esperante E. Perseke

Ĉirkaŭaĵo kaj Ekologio P. Potin

Lieno kaj ĝiaj misteroj S.G.

Pri la problemoj solvendaj
Kio ĝi povas esti ? A. Logvin

Silvestro la arbarmastreto J. Kraemer

Por via distro
Nia konkurso P. Chevalier

Gramatiko per bonhumoro

KULTURAJ KAJEROJ
ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ
spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ
publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ
respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ
prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

Ni respektu la naturon

En tiu ĉi numero vi povos legi artikolojn pri la papilioj kaj pri ekologio, kaj belan rakonton por infanoj, « La arbarmastreto », verkitan de Sro Kraemer, granda amiko de la naturo. Tiu renkonto de samtemaj artikoloj ne estas koincido.

Granda kampanjo, por ke la homoj ne detruu la naturan medion en kiu kaj per kiu ili vivas, estas laŭnĉita. Kaj al tiu kampanjo ni alportas briketon ĉar fakte la homoj ne konscias, ke ĉirkaŭ ili ne nur svarmas aliaj homoj sed ankaŭ vivas estaĵoj, kiuj rekte aŭ nerekte helpas ilian vivon kaj, almenaŭ pro tio, devas esti respektataj. La urbanoj profitas ĉiun liberan tagon por elveturi el la bruemaj stratoj, la malbonodoraj fumplenaj urboj al la kamparo. Por ili la kampoj, riveroj, arbaroj konsistigas veran paradizon. La kamparaj koloroj, tiel riĉaj kaj diversaj plaĉas al la okuloj lacigitaj de la grizaj muroj, la agresantaj lum-reklamoj de la urboj. Kio estas pli bela ol la plumaro de la plej multo el la birdoj, la flugiloj de la papilioj, la elegantaj movoj de sciuro, la koloroj de la floroj eĉ plej modestaj? Kiu ne sentis sin pli feliĉa aŭdante la kantojn de la birdoj frumatene aŭ posttagmeze sub la malvarmetiga branĉaro de arboj? Ĉu la odoro de fojno freŝe falĉita, tiu de la pinoj fine de varma tago, de la grundo kaj de la herbo post printempa pluvo ne estas agrablaj?

Ĉu ni ĉiuj, kiuj trovas plezuron en la naturo, faras nian eblon por konservi tion, kio donas al ni tiun plezuron? Ĉu ne malplaĉas al la okuloj la malpuraj paperoj disflorantaj sur herbejo flanke de subarba piknikejo? Ĉu malplaĉa ankaŭ ne estas larĝa makulo de aŭto-oleo sur herbo konsekvence detruita? Ĉu ni pensas, ke rompo de branĉoj grave vundas la arbojn, kiuj spiras per siaj folioj? Ĉu ni pensas, ke preni papilion inter siaj fingroj plej ofte signifas mortigon de tiu rava insekto? Se ni detruas la florojn, kie trovos sian nutraĵon la abeloj, kiuj plie helpas en la fekundado de la plantoj? Se ni detruas birdojn, kiu liberigos la plantojn je iliaj insektaj malamikoj?

Alproksimiĝas la somero. Jam multaj el ni vizitas la kamparon okaze de semajnfinoj. Ni ne forgesu, ke ni mem kulpos se malaperos aŭ ŝanĝiĝos la « anguleto », kien ni ŝatas iri kun la familio aŭ amikoj.

Ne forgesu tion, amikoj, kiuj tiom ŝatas la belan parkon de Gresillon !

Ĉu vi rezervis vian liton en Grésillon ?

Faru tuj

Esperanto tra la Mondo ★

Kongresoj - Renkontoj.

— « Konflikto de generacioj : ĉu realaĵo aŭ preteksto? » estos la temo de la ĉi-jara kongresa debato, kiu donos al kiu ajn kongresano la okazon esprimi sian vidpunkton.

La Okazon

— La kongresa komitato interkonsentis kun la Aŭstra Vojaĝoficejo vizitojn al Praha kaj Budapeŝt.

— Esperantista Kultura Festivalo en Opava, aranĝita por la 200a naskiĝdatreveno de L. van Beethoven. Skribu al : Esperanto-rondeto « Ostroj », p.k. 28, Opava, Ĉeĥoslovakio.

— Internacia Konferenco pri Kamensky en Prerov (25-30 de julio). Skribu al : Muzeum J.A. Komenskeho, Ph. Dr. Gustav-Vozda, dir. Horni nani c.l., Prerov.

— Internacia esperantista renkontiĝo (kun ŝakturniro), 4-12a de Julio. Esperanto Klubo, Podebrady, Ĉeĥoslovakio.

— Internacia renkontiĝo de Naturamikoj, 18-28a de julio, en kampadejo ĉe Abaliget. Adreso : Teritoria Komitato, Pécs 1, pf. 2, Hungario.

— Internacia renkontiĝo de Naturamikoj, ged.. Emeriko Szekely, Lenin krt. 61, Szeged, Hungario.

— 2-a Internacia Balatona Esperanto-Ferio, 17-30 a de julio, Hungara Esperanto-Asocio, Budapeŝt VIII Kenyérmezö ut. 6. I.

En la Universitatoj.

— La fako de lingvoj en la universitato Pontifica Bolivariana en Kolombio, instuas nun ankaŭ esperanton.

— La unuan fojon en Francujo Esperanto estas instruata en Universitato. La studentoj pri lingvoj en Clermont-Ferrand povas elekti la internacian lingvon por la finjaraj ekzamenoj.

El Hungario.

La Hungara Pen-Klubo ĉi-jare donis sian honor-medalon al Kalman. Kalocsay, kiu tradukas majstrajn literaturaĵojn el la tuta mondo al Esperanto kaj ankaŭ gravajn studojn pri la gramatiko kaj stilo de Esperanto. Usonano Aleksis Rannit, preleginto ĉe la 36-a Internacia Kongreso de PEN, skribis en New York Times Book Review : « Mi kredas, ke verkantoj en Esperanto, precipe poetoj kaj tradukpoetoj, jam starigis literaturajn tradiciojn de tia kvalito, ke ili superas konsiderindan nombron da verkaĵoj en la tiel nomataj naturaj lingvoj ».

El Pollando.

Pola Radio raportis, ke en januaro proksimume 150 edukistoj kunvenis en Lodz, por diskuti la rolon de internacia lingvo en la eduko de infanoj. Dum la konferenco oni malfermis Internacian Ekspozicion de la Infana Arto, kiu enhavis artaĵojn de infanoj de 56 landoj.

— Unu el la plej popularaj kanzonaj ensembloj en Polujo hodiaŭ estas « Muzilo », grupo de avangardaj studentoj el Wroclaw. Ne kontentante pri la famo de la muziko, kiel « internacia lingvo », Muzilo kantas siajn modernajn kanzonojn en Esperanto, per kiu ili intencas ne nur konigi muzikon tutmondan al sia hejmlando sed ankaŭ popularigi la polan kanzon-arton eksterlande.

— En tiu lando, kie oni instruis la Internacian lingvon Esperanto en 56 lernejoj kaj universitatoj dum la lasta studjaro, la cifero ĉi-jare atingis 91, laŭ informo disaŭdigita de Pola Radio.

El Bulgario.

Okaze de la 25-a datreveno de la fondo de la Popola Respubliko la Ministro de Komunikado de Latva S.S.R. sendis saluton al sia bulgara kolego, ministro Stojan Tonĉev en Esperanto. Ministro Tonĉev reciprokis la salutojn per la sama lingvo.

Periodaĵoj.

« SENNACIULO », ĉiumonata organo de SAT aperas regule kun multaj originalaj kontribuoj pri socipolitikaj, ekonomiaj kaj ĝenerale homaj problemoj. Abono (kun aŭ sen membreco al SAT) en Francio : 22 f. Pri aliaj landoj petu informojn rekte al : SAT, 67, avenue Gambetta, Paris-20, poŝtkonto 1234-22 Paris.

Amikeca Semajno.

Nova tradicio, iniciata de la esperantistoj, « Semajno de Internacia Amikeco » estis tutmonde solenata inter la 22-a kaj 28-a de februaro, laŭ anonco de la aŭspicianta internacia agkomitato. Sub la moto « Amikeco trans limoj », la Semajno celas instigi ĉiujn homojn ne nur memori sed ankaŭ rekontakti siajn forajn amikojn, sendante salutojn kaj donacetojn.

Esperanto en Komerco.

Ĝis nun, la aŭtomobila firmo Fiat eldonis kvin filmojn en esperanto (8 kaj 16 mm.) kaj multajn presaĵojn. La tuto estas ricevebla ĉe Fiat-Direkcio, Stampa el Publicita, Corso Marconi 10, 10125 - Torino, Italio.

SEKRETA VIVO DE LA PAPILIOJ

La sciencistoj opinias, ke sur nia malgranda planedo, vivas 960.000 specoj da bestoj ; inter ili la papilioj nombras pli ol 100.000 specojn, kies origino datumas de 50 kaj eĉ 100 milionoj da jaroj.

La papilio estas « laborloko, kiu vivas sur si mem ».

De la ovo eliras raupo, kiu grandiĝas, plurfoje haŭto-ŝanĝigas ; kiel krizalido aŭ nimfo ĝi trapasas periodon da ripozo preskaŭ kompleta dum kiu ĝi ne sin nutras, kvankam ĝi eltenas internajn transformojn ekstreme profundajn. Je tiu stadio okazas kemiaj kaj morfologiaj mutacioj tre kompleksaj : temas pri histogenezo.

Tamen, malgraŭ diversaj adaptiĝoj, ĉefaj organoj : koro, nervaro, generiloj kunportas ĝis la adoltulo la esencajn elementojn de la papilio. Oni devas rimarki, ke tiu aŭtonomio de la krizalido rilate la ĉirkaŭan mondon estas preskaŭ ununura en la animala regno. Je la kvara metamorfozo (4 estaĵoj ŝajnas anstataŭigi unu la alian) la papilio, perfekta insekto, rompas sian envolvaĵon kaj ekflugas al nova aera vivo, rava sed mallonga !

La ovo, demetita en junio-julio, baldaŭ interrompos sian evoluadon ĝis majo de la sekvanta jaro : 9- monata ripozo ; la raŭpo, kiu komencas sian vivon fine de somero endormiĝas ĝis la venonta printempo. Krizalidoj dormas dum vintro, eĉ ankaŭ kelkaj papilioj : la « Vanessa Io » (eta tago-pavo) povas resti dum tuta vintro sur la fenestro-kurteno.

Grava malpliigo de metabolo (okazigata de malaltigo de temperaturo) akompanas tiun ripozo-staton, dum kiu la gasaj interŝanĝoj iĝas tre malfortaj.

La perfekta insekto konsistas el kapo, 2 antenoj, torako kun 6 kruroj kaj du paroj da flugiloj, abdomeno, la tuto kovrita de artikita kiraso, kiu donas al la papilio muskolaron tre superan al tiu de multaj « superaj » bestoj : kelkaj insektoj povas porti 20 foje sian propran pezon.

Kiom da danĝeroj staras antaŭ la papilio, jam de ĝiaj unuaj paŝoj : insidaj parazitoj, ĉiaj ajn predantoj : lezardoj, sorikoj, birdoj ; ankaŭ homo, kiu modifas la terenojn, forigas novalojn, detruas arbarojn, peraviadile inundas tutajn regionojn per insekto-mortigiloj ; ni ne forgesu frenezaĵojn de iaj papilio-ĉasistoj kaj kolektantoj. Nepre, la papilio devas lukti por konservi vivon kaj pluigon de la specio. Je tiu celo la Naturo donis al ĝi sensojn ekstreme subtilajn, mimetismon, kamufladon kaj eksterordinaran aŭdacon.

La papilio estas konstituata por flugi. Je ĝia eliro, la flugiloj estas ĉifitaj, molaj kaj plenigitaj je sango ; iom post iom ili malvolviĝas ĝis normala strukturo ; je tiu momento iliaj duoblaj kitinaj vandoj rigidiĝas ĝis bona funkciado. Ripoj, kies dispozicio estas konstanta ĉe determinata speco, konstituas kvazaŭan armaturon.

Dum la flugado, ĉio okazas kvazaŭ la papilio estus monoplano kaj ĝi havas nur unu paron da flugiloj. La flugiloj estas kovrataj de skvamoj : delikataj strukturoj tute specialaj, kies rolo estas ĉefa : al tiuj multegaj skvamoj kaj al ilia dispozicio, la papilio ŝuldas kolorojn kaj desegnojn.

La pigmentoj estas kemiaj substancoj : oni povas ilin ekstrakti pere de konvenaj solviloj : ili alportas al nia okulo sensaĵon de determinataj koloroj :

— la « melanino », nigra pigmento ;
— la verdo, ĉe la flugiloj de la « pieridoj » ;
— la flavo el la « pterinoj », kiuj ludas gravan rolon en la intimaj spiro-fenomenoj de la ĉeloj, kaj inter kiuj kelkaj povas anstataŭigi vitaminojn B-I kaj B-2 ;
— la ruĝaj pigmentoj, proksimaj je la « bilirubino » sed kiuj entenas feron, kiel la hemoglobino.

La optikaj fenomenoj donas metalecajn kolorojn. Samajn optikajn fenomenojn ni vidas ĉe sapo-veziko, kiu ŝajnas al ni iriza ; ankaŭ ĉe guto de oleo sterniĝanta sur humida surfacaĵo : en ambaŭ kazoj ne temas pri pigmentoj.

Ankaŭ tra prismo la lumo dispartiĝas en siajn elementajn radiadojn (de la ruĝo kaj oranĝ-koloro al la bluo kaj indiga kaj viola koloroj). Tute same okazas ĉe la skvamoj de la papilio-flugiloj.

Al tiu dispartiĝo de la lumo aldoniĝas « lum-ludoj » : interfero kaj difrakto, fizikaj fenomenoj.

Tre ofte, pigmentoj kaj optikaj fenomenoj kuniĝas ĉe skvamoj por senlime kaj mirinde diversigi la kolorojn de la papilioj. Tre kompleksa estas la rolo de tiuj skvamoj. Kiel tegolo sur tegmento ili povas esti aŭ tegolaranĝitaj unu ĉe la alia, aŭ disigitaj per sufiĉe grandaj intervaloj, aŭ anstataŭigitaj per fajnaj haroj.

Senigita je siaj skvamoj, la papilio estas tute nerekonebla : ĝiaj flugiloj reflektas la sun-lumon, kiel spegulo, kaj altiras la birdojn. Plue, ĝia flugado estas neripareble afekciita. Fakte la skvamoj pliigas la dikecon de la flugilo, kiu estas proksimume de 3 ĝis 5 dekmilonoj da milimetro. Ŝajne ili ankaŭ rolas kiel amortiziloj de la aerpremo ĉe momento de flugilbato.

Plue ilia ekzisto kondiĉas, por la papilio, la sorbon de radioj lumajvarmecaj.

En julio 1930 S-ro Paul Portier, profesoro en Sorbonne pri fiziologio, promenis je 1.000 metra altitudo sur Pireneoj. Li estis admiranta la majestan flugadon de Apoloj-papilioj. Subite nubo kaŝis la sunon : preskaŭ tuj, tien kaj ĉi tien, la papilioj falis teren kun la flugiloj disetenditaj, kiel paraŝutoj : eĉ reĵetitaj aeren, ili refalis kaj tere restis kvazaŭ paralizitaj, ĝis kiam la suno denove brilis ; tiam la Apoloj rekomencis flugadi.

Prof. Portier portis unu el tiuj Apoloj en ombro de arbo : la papilio restis senmova ; sed apenaŭ sunradio ĝin tuŝis, ĝi ekflugis. Kompreneble tia sperto kondukis al aliaj eksperimentoj en laboratorio pri la rolo de la lumaj-varmecaj radioj sur la papilioj.

Oni konstatis, ke la sorbo-povo de la skvamoj atingas 70-95 % laŭ la koloro de la makuloj ; la nigro sorbas 95 % de la radioj.

Plie oni rimarkis, ke la temperaturo de la flugilo varias de unu punkto al alia ; tiu malsameco de la temperaturo okazigas cirkuladon de la likvaĵoj kaj de la gasoj entenataj en la flugilo ; do, la flugilo estas ne nur subteno-aparato ankaŭ vera helpa trakea pulmo.

Oni observis « Sfinkso-n » ; ĝi restas senmova dum la tuta tago ĝis la krepusko. Je tiu momento la flugiloj komencas moviĝi kaj zumas dum tempo plimalpli longa ; fine la papilio ekflugas dum la tuta tempo necesa por trovi sian nutraĵon en la naturo. Poste ĝi denove haltas por ripozo dum la tuta nokto. Sama fenomeno okazas ĵus antaŭ la tagiĝo. Longa observado rivelis, ke tiu zumado de la flugiloj, laŭ daŭra ritmo, altigas la temperaturon de la nokta papilio. Kiam ĝi atingas 35-36° la amplitudo de la flugilbatoj estas maksimuma kaj la papilio povas ekflugi.

Oni rimarkis, ke la ekfluga temperaturo estas konstanta, kia ajn estas la ĉirkaŭa temperaturo, sed la zumado-daŭro estas inversa de tiu ĉirkaŭa temperaturo.

Konklude, la zumado okazigas intensigon de la papilio-metabolo ; la nokta papilio uzas siajn muskolajn kuntiriĝojn por anstataŭigi la sunajn radiojn necesajn al la diurna papilio.

La odoroj havas fundamentan rolon en la vivo de la papilioj, rilate nutro-serĉadon, aŭ seksan altiron. Maskloj kaj inoj eligas malsamajn parfumojn, ĝenerale difuzatajn de odorantaj skvamoj aŭ de hartufoj (« androkonioj »).

La altira povo de la ino estas tia, ke ĝi impresas eĉ personojn tute neatentajn pri tiu biologia fenomeno. Maskloj traflugis ĝis 11 km por retrovi inon.

Oni rakontas pri naturesploranto, kiu revenis hej-

men eskortita de 200 maskloj : en lia poŝo ino estis enfermita !

Pri alia, kiu havis en sia ĉambro belan inon. Ĝenata de papilioj, kiuj volis eniri, li fermis la fenestron ; post momento li aŭdis strangan bruon en la forno, ne uzata dum somero ; li levis la kovrilon kaj tuta trupo da maskloj ekflugis en la ĉambron : kameno kaj kamentubo ilin kondukis al la Amatulino.

La parfumoj eligataj de la masklo estas percepteblaj de nia flar-sento (sed ne tiu de la ino). Inter la aromoj eligataj oni povas identigi tiujn de rezedo, oranĝ-floro, heliotropo, primolo, spireo, vanilo, eĉ ĉokolado, mosko, ananaso. Ŝajnas, ke la masklaj odoroj ankaŭ ekzaltas la generan senson de la ino. Cetere ĉiu speco havas, por tiu odoro-difuzo, propran teknikon.

Masklo, kiu serĉas inon ĉiam kontraŭ vento flugas : lin altiras ankoraŭ ne fekundita ino (escepte por kelkaj specoj, kiuj povas ricevi plurajn sinsekvajn fekundadojn — alterne kun parta ovo-demeto). Malkovrinte ŝin, la masklo ŝin postsekvas ; kiam ŝi haltas, li venas apud ŝin, ĉirkaŭiras ŝin kaj fine ankaŭ haltas. Post eleganta flugil-bato li direktas siajn kunigitajn antenojn al la antaŭaj kruroj de la ino por ilin tuŝeti. Denove li malfermas siajn flugilojn kaj bruske ilin refermas ĉirkaŭ la antenoj de la ino, kiu ĝis tiam restis tute senmova (en aliaj specoj, la masklo turniĝas super la ino kaj faligas sur ŝin delikatan polveron de odorantaj skvamoj).

Post tiu honora saluto la ino iom levas siajn flugilojn kaj pariĝo okazas. Se la paro estas ĝenata, estas la ino, kiu forflugas kunportanta masklon tute pasivan.

Poste ŝi demetos siajn ovojn sur planton, sur tigon aŭ folion, aŭ, flugante, sur graminacojn.

Ĝia biologia rolo estas finita. Baldaŭ mortos la papilio !

La adolta papilio, de floro al floro rikoltetas la sukeran nektaron. Same kiel la abelo. ĝi rolas en la fekundado de tiuj floroj : estas reciproka kooperado, kiu plej profitas al ambaŭ.

Plej spektinda estas la rolo de la Sfinkso ; ĝi frandas la nektaron de kelkaj konvolvuloj. Kiam la floro estas preta, nur fare de la Sfinkso ĝi povas malfermiĝi ; la papilio disvolvas sian rostreton kaj ĝin enigas en la kalikon. Stranga fakto : eĉ se oni tuŝas la floron, ĝin skuas, estas sen rezulto, la floro ne malfermiĝas.

En centra Ameriko vivas eta papilio : Tegetuculo. Nur ĝi povas polenadi la floron de Yucca ; ĝi prenas la polenon kaj pere de sia stileto ĝin enprofundigas en la pistilon de la floro. Kompense, ĝi demetas siajn ovojn ĉe la bazo de tiu pistilo ; ĉi tie la raŭpetoj kreskos, tamen ne elĉerpante la nutrajn kaj esencajn vivrimedojn de la frukto ! Nesondebla Saĝo ! Naturesploranto malkovris en Madagaskaro orkideon, kies kaliko mezuras 25-30 centimetrojn ; longtempe li serĉis la papilion kapablan fekundi tiun floron. Fine, post 12 jaroj li malkovris la « Macrosilia », kies rostreto mezuras 20-25 cm.

Niaj okuloj facile moviĝas por rigardi ĉirkaŭen. La okuloj de la papilio ne moviĝas sed ĉiu scias, ke tiuj okuloj estas ŝacetaj (15.000 - 20.000 facetoj) ; ĉiu faceto konsistas el dioptria aparato (kristalino kaj lenso) kaj profunda nervaro, kiu entenas 6 aŭ 8 vidajn ĉelojn. Estas vera mozaiko, kiu estas projekciata sur la nervajn centrojn (ankaŭ nia retino fragmentas la bildon, poste rekonstituata de la nervaj centroj).

Al tiu speciala vidpovo la papilio aldonas subtilan aŭdsenson. Eksperimente oni arigis masklojn kaj inojn en apartaj kaĝoj. La sonoj eligataj de la maskloj estis kaptataj en receptilo ; al ĉi tiu sin turnis la inoj ; eĉ ili flugbatis kaj forflugis.

Ekzotikaj papilioj (ageronia feriona) eligas knarilbruon, kiam ili vidas alian papilion.

Noktaj papilioj povas sensi la ultrasonojn emisiatajn de la vespertoj.



Disvolvigante sian livreon flamantan sub suno, la papilio dangere sin signalas al siaj malamikoj. Sed ĉi tie, kiel alie, la Naturo per diversaj ruzajoj ilin helpas en ilia konstanta lukto por vivo kaj pluigo.

Morfo, mirinda sud-amerika papilio, subite disetendas siajn flugilojn ; ilia elektreca bluo, kiel fulmo blindumas sian malamikon ; ĝi profitas tiun dumsekundan surprizon por forflugi.

La « Cymothoë sangaris » pere de la brila ruĝo de siaj flugiloj, avertas ke ĝi estas amara kaj nemanĝebla ; prapatra sperto tion instruis al la birdoj.

En Amazonio kunvivas « Helikonidoj » kaj « Itomiides » ; iliaj koloroj estas brilaj kaj allogaj ; ili vivas en multenombraj svarmoj kaj povus esti facila predo : sed ilia odoro kaj saporo estas forpuŝantaj kaj ilin protektas kontraŭ predantaj birdoj kaj lacertoj.

La « Kalimas » kun flugiloj fermitaj, rigidiĝinte sur branĉo aspektas mortinta folio kun ĝiaj ripoj kaj pedunklo.

Alia tropika papilio similas arbo-ŝelon. La « Schizura » kun flugiloj refalditaj, montriĝas kiel seka branĉeto. La « Lithosies » similas stoplon de graminacoj.

Kiel vespo la inda « Sfinkso-Satapes » movas sian abdomenon, kiel por piki kaj tute same zumas. Ankoraŭ kiel vespo la « Syntomide Trichura » kun travideblaj, fajna talio kaj falsa pikilo ĉe la abdomeno.

Nialanda « Trochinium » kun travideblaj flugiloj kaj flava anela korpo tute similas krabron.

En Afriko simioj forkuras, terurigataj de raŭpo, kiu ŝajnigas serpenton.

Pri tiu fenomeno, Paul Portier notis kelkajn rimarkojn :

— mimaj papilioj plejofte vivas en arbaraj regionoj
— la kopiata modelo ĝenerale estas multe pli abunda ol la falsisto
— ĉiu sekso imitas la korespondanton, sed la inoj multe pli kapablas imiti ol la maskloj ; tio celas protekton de la speco
— la falsaĵo koncernas nur supraĵajn modifojn kaj aspekton.

Kia ajn estas ĝia efiko-grado, mimetismo grave rolas kiel protekto-rimedo.

Tamen oni ankoraŭ ne malkovris la sekretojn de tiu mirinda fenomeno !

S. G.

(el dokumentoj de Connaissance du Monde)

Pupoj komencis paroli Esperante

Mi tre bone memoras la jaron 1955. Subite elkreskis en mi la deziro ellerni la Internacian Lingvon. Mi serĉis esperantistojn kaj trovis s-ron Firmenich, malnovan amindan Zamenhofanon, kiu helpis al mi kompletigi mian memlernadon. Baldaŭ mi skribis en Esperanto pupkomedion kaj decidiĝis kun miaj gantpupoj partopreni la Universalan Kongreson en Bologna dum aŭgusto. Mi korespondis kun la Prezidanto de LKK s-ro Degliesposti kaj li konsentis, ke mi montru mian teatraĵeton. Sed kiel singardema homo li volis konvinkiĝi pri la kvalito de prezentado antaŭ la definitiva aprobo. Mia bofilo kun frato kaj mi, ni veturis per aŭtomobilo Italujon kaj bone alvenis en Bolonjo, kie s-ro D. nin afable bonvenigis. Ni starigis niajn tendojn en la Kampadejo : « Verda Stelo » de s-ro prof. Agostini. La bela ĝardena herbejo estis jam okupita, kaj ni devis kontentiĝi per la loko sur la monteto. Dum la nokto pluvegis kaj ŝtormegis kaj en la malaltaj partoj de la tendejo fariĝis deluvo, kaj nun *ni* estis la feliĉuloj. La duan tagon s-ro D. vizitis nin. Ni fiksis inter 2 arboj ŝnureton, transĵetis kovraĵon kaj mia Kaŝperlo, sorĉistino, drako ktp komencis siajn « kapriolojn ». En la herbo sidis la Prezidanto kaj li amuziĝis. Li decidis tagon kaj horon de la unua publika esperanto pupkomedio. En la kongresejo sur la ŝtuparo de la atrio mi iomete instruis la filinon de la Prezidanto, kiu afable transprenis rolon de la reĝidino, kaj ŝi baldaŭ ellernis la kanton kaj korŝire ploris. Lasta provo okazis en la kampadejo en la pordo de la daĉo kaj deponejo por pakaĵoj. La Prezidanto kaj helpantoj pentris afiŝojn : « Kaŝperlo kaj la sorĉistino Kukimora. Pupkomedio por infanoj de 3 ĝis 83 jaroj. Ludos la plej malgrandaj esperantistoj en la mondo ». (La originalajn afiŝojn kaj la manuskripto troviĝas en la Esp. Muzeo en Wien).

Poste ni konstruis provizoran teatreton per stangetoj, vestaĵfosto, papero, kovraĵoj. Mankis ankoraŭ kulismalantaŭo. Post mallonga pripenso sinjoro D., mi kaj bofilo Gerhardo rapidis per aŭto al la larĝa strato, kie la pentristoj etendis siajn pentraĵojn sur pavimo kaj trotuaro, ni elektis du bildojn kun kastelo kaj arbaro, pruntepreni ilin kaj reveturis transkapiĝe al la salonego, kie staris nia teatro. Baldaŭ pleniĝis teatrejo venis 30 italaj infanoj, ĉiuj aliaj estis plenkreskuloj. Kaj nun komenciĝis laŭ mia scio la unua pupprezentado en Esperanto. Ankaŭ la nur itale parolantaj personoj sekvis kun intereso la komedion. Profesoro Agostini akompanis nin per la piano, reĝidino kantis, ĝemis, ploris, ridis ; Kaŝperlo faris siajn ŝercojn ; sorĉistino transsorĉis Jonatanon en drakon ; kaptita reĝidino lamentadis ; kompreneble Kaŝperlo venkis finfine kaj ĉiuj estis kontentaj, aplaŭdis, sed la plej entuziasmigitaj estis la italaj infanoj.

Bedaŭrinde la permeso de mia bofilo finiĝis, ni adiaŭis kun granda emocio la teatrovizitintojn, ni forlasis la gasteman Bolonjon kaj reveturis norden. Vespere ni haltis en malgranda gastejo kaj tendumis en la ĝardeno sub fruktarboj kaj vinberujoj. Poste ni sidis en la laŭbo tegmentita per stangetoj volvitaj per vinberfoliaro. Antaŭ ni sur la tablo staris pokaloj plenaj de vino. Ĉe la alia tablo sidis junaj geitaloj, ili kantis, ŝercis, amuziĝis, ridis kaj subite plonĝis io en la pokalon de Gerhardo, kaj malantaŭ la glasbordo elrigardaĉis verdaj okuloj. Frapite ni rigardis unu la alian, kaj poste ni plengorĝe ridis. Gerhardo serĉis la italan vorton por atentigi la italajn gejunulojn ; ne trovinte ĝin, mi kriis esperante : « Rano verda en la vino ». Ili tuj komprenis, alkuris, ĉirkaŭis nin ; komenciĝis babilado esperante ; G. balbutis itale, kaj kiam li rakontis pri miaj marionetoj, ili tuj volis vidi miajn pupojn.

Inter la junularo estis ankaŭ granda buldogo. Kiam mia drako gruntante kaj grumblante malfermis kaj fermis sian faŭkon, ĝi malice murmuregis kaj la salivaĉo elfluis el ĝia buŝego. Poste, dum la nokto, ĝi ĉirkaŭis hurlante mian tendon serĉante la drakon. — Alian tagon ni forveturis. Estis jam malhele, kiam ni trapasis trifoje la landlimon ; la 4 an fojon la doganisto ne fidis niajn senkulpajn okulojn, traserĉis la veturilon, trovis 1-2-4-7 botelojn da itala vino, furioziĝis, kaj ni estis devigitaj malpaki niajn valizojn sur la strato. Ankaŭ la pupoj kuŝis ekstere ; mi rigardis ilin kaj meditis :

« Ho, kun siaj okuloj sur la steloj fiksitaj,
jen karulo Kaŝperlo, kun braket' etenditaj,
jes, li kuŝas meznokte sur la nigra pavimo ;
kaj la metroj nur kelkaj ĝis proksima landli-
[mo !...
Nun mi aŭdis lin plendi al la reĝa idino :
— Ĉu la malgrandemeco kaj — la malamikeco
kaj la dogana pago kaj kolerekscitecо
do valoras ja kelkajn botelojn da vino ».

Kaj la moralaĵo de tiu fablo ? — Se mankas bonhumoro kaj hom-komprenemo eĉ pupoj estas senpovaj.

Edgar Perseke
D 51 Aachen, Turpinstr. 104

(kiu instruos pupteatron en Grésillon
de la 12 - a ĝis la 26 - a de Julio)

ĈIRKAŬAĴO KAJ EKOLOGIO

La juna Scienco **Ekologio** (grekaj radikoj : oikos = domo, kaj logos = scienco) estas branĉo de la Biologo, kaj pli precize sistemo de alproksimiĝo al la naturo, por studi kiel vivantaj organismoj kaj la nevivantaj ĉirkaŭaĵoj kune funkcias kiel **tuto** t.e. « **Ekosistemo** ». La nomo Ekologio estas ofte uzata por sugesti ian sintenon pli ol disciplinon.

La nuna zorgo rilatas al ensemblo de fenomenoj, kiuj endanĝerigas la vivkondiĉojn sur nia malnova, vundita planedo...

Vundita de kiu ? De la homo. Aktualaj danĝeroj por kiu ? Por la homo ! ofta viktimo de sia propra Scienco.

Por bone taksi la evoluon de tia situacio, necesas konsideri unue nian **Biosferon.**

Tiu Biosfero estas ideala, relative tre maldika, ĉirkaŭvolvaĵo de la tero, en kiu povas normale prosperi la nura konata vivo de la Universo, dank'al komplekso de interdependaj ekvilibroj atmosferaj, grundaj, maraj kaj subteraj.

Antaŭ almenaŭ 400 milionoj da jaroj, primitiva akcidento ebligis la plantvivon, kiu pli riĉigis la atmosferon per miksaĵo de 20 % da oksigeno, plus nitrogeno, argono, karbona dioksido kaj akva vaporo.

Kun stranga precizeco, tiu miksaĵo estis konservata per la plantoj, la animaloj, la bakterioj, kiuj utiligis kaj restituis la gasojn en samaj kvantoj. De tiu rezultis fermata sistemo, ekvilibrata ciklo, en kiu nenio estas perdita kaj ĉio valoras. Ekzemple, ĉirkaŭ 70 % de la teroksigeno estas produktata de la oceana fitoplanktono — pasive flosantaj plantoj kaj etanimaloj — tiu tuta vivanta sistemo modifiis la temperaturojn, bremsis la inundojn kaj nutris la homojn antaŭ ĉirkaŭ 5 milionoj da jaroj.

Nur se la Biosfero supervivas, la homo ankaŭ vivos.

Sed al tiuj fizikaj kemiaj, biologaj kondiĉoj, aldoniĝas problemoj pri la ĉiutagaj agresoj, fare de neelteneblaj streĉadoj de la moderna vivo. Fizike kaj mense, speciale en niaj urboj, la homo estas submetata al netolereblaj atakoj : akcelita ritmo, frenezigaj bruoj, sufokantaj haladzoj. Plie, masiva produktado kuntrenas masivan forĵetaĵon, malfacile kontroleblan.

La grava demando por la venontaj 10 jaroj estas, laŭ la Usona Prezidento : « Ĉu ni rezignos antaŭ niaj ĉirkaŭaĵoj, aŭ ni decidos estigi pacon kun la Naturo, kaj ĉu ni komencos fari riparojn por kompensi la domaĝojn kaŭzitajn al nia aero, nia grundo, kaj nia akvo? » En Usono Profesoro Commoner el Vaŝintona Universitato staras ĉe la avangardo de la batalo.

Franca Socia Antropologo Claude Lévy Strauss komparas la hodiaŭan kondiĉon de la homo al tiu de la vermoj enfermitaj en sako da faruno. « Kiam la nombro de tiuj vermoj tro krestas, eĉ antaŭ ol renkonti unu la alian, ili eksekrecias specialan tokson, kiu mortigas je distanco, do ili venenas la farunon en kiu ili sin trovas... kaj ili mortas ! »

Ambaŭ homoj kaj vermoj finfine nepre bezonas la helpon de la Ekologistoj ! Kelkaj el ili ŝajnas pesimistaj profetoj, sed aliaj permesas esperigan perspektivon.

Laŭ Commoner, ni havas sufiĉan tempon — eble unu generacion — por savi nian ĉirkaŭaĵon el la finaj rezultatoj de la perfortaĵoj al kiuj ni submetis ĝin.

Daŭrigota

S-ino P. Potin

(Dokumentoj el « Time »)

Lieno kaj ĝiaj misteroj

Kovilo por globuloj, tombejo por hematioj, kaptilo por mikroboj, tiu organo estas unu el la plej strangaj en nia organismo. Ĉiakaze ĝi estas multe pli grava ol ĝia diskreteco permesas pensi.

Post aŭtomobilo-akcidento ambulanco transportis du el la vunditoj... pro ilia tre malbona stato, al hospitalo de najbara granda urbo. La tria, malpli tuŝita, restis en la kampara hospitalo. Li estas hakisto, forta viro, 30-jara, kaj li energie protestas. « Sed mi certigas al vi, mi havas neniom ; mi volas reiri hejmen ; mia edzino atendas duan infanon kaj multe maltrankviliĝos se vi gardas min ».

Tamen la dežoranta kuracisto denove serioze aŭskultumas tiun klienton. « Kompreneble, mi estis iom ŝokita pro la kolizio kun la alia veturilo, sed mi eĉ ne svenis ! nun mi sentas min tute bonstata ; mi volas foriri ! » La kuracisto ne cedas kaj, pro singardeco, enhospitaligas la viron.

La morgaŭon matene la ĉef-kuracisto faras sian viziton kaj trovas nian hakiston jam ellitiĝinta. Impetece li petas, ke oni lasu lin foriri ; verŝajne, li ricevis nur kelkajn « bluaĵojn ». Tio tamen surprizas la praktikistojn, ĉar la aliaj akcidentitoj estas grave vunditaj : la pelvo de la unua estas rompita kaj, krom multaj frakturoj la alia havas gravan vundon ĉe la kapo.

Tamen post lasta aŭskultumado, oni permesas al la viro foriri ; sed, antaŭe, li devas subskribi senkulpigon por neniigi la prirespondecon de la hospitalo.

Oktagojn pli poste nia hakisto sentas leĝeran malsaneton kaj post kelkaj horoj li mortas.

La Prokuroro postulas nekropsion ; la ĵurkuracisto asertas, ke fulmo-rapida interna hemoragio, pro rompo de lieno kaj sekve al la aŭtomobilo-akcidento, okazigis la morton.

Doktoro Jean de Kearney, specialisto pri akcident-medicino, bone konas tiujn tragediojn : « Verdire, ĉar la medicinistoj fariĝis pli kaj pli singardaj, tiuj tragedioj estas malpli oftaj. Cetere, ĉe grava akcidento, la pasaĝeroj, plej ofte, ricevas aliajn vundojn, kiuj necesigas enhospitaligon.

Lieno-rompo (se ĝi okazis ĉe sana lieno) ne plu estas angora operacio. Post ĝia eltranĉo la vundito bone resaniĝas kaj havas normalan vivon.

Tia estas la lieno : diskreta organo, preskaŭ mistera kaj eĉ paradoksa ; se ĝia funkciado perturbiĝas, tio, iom post iom, kondukos al morto.


Okaze de elrompiĝo de lieno, dum akcidento, morto okazos post kelkaj horoj Sed, se estas la kirurgiisto kiu ĝin elprenas, oni povas facile vivi sen tiu organo. Fakte, estas la aliaj organoj, kiuj anstataŭigos ĝin : hepato, limf-ganglionoj, kaj osto- medolo prenas sur sin parton de la lieno-funkcioj. Plej diskreta estas la lieno : ĉiu ajn povas konstati, ke li havas koron (pro ĝiaj palpitacioj) pulmojn (pro spirado). Li scias, kie estas lia stomako, lia hepato kaj eĉ lia dika intesto. Sed lieno ? ĝi estas silentema, normale nepalpebla, escepte dank'al pacienca aŭskultumado. Ŝajnas, ke ĝi volas sin kaŝi (oni rimarku, ke lieno facile palpebla sub la fingroj estas malbonstata). Ĝi kaŝigas en nia abdomeno, maldekstre, proksimume samnivele kiel hepato (inter bazo de pulmo, stomako kaj maldekstra reno) Tre malantaŭe gi estas fiksita ĉe peritoneo. Eĉ por eksperimentita praktikisto estas malfacile ĝin aŭskultumadi. Plie lieno, eĉ vundita, povas plej ruze erarigi la plej bonajn kuracistojn.

D-roj Orloff kaj Peskin en Montpellier-Fakultato rimarkigis, en komuniko, ke fronte al dudek-du lieno-rompiĝoj, nur unu estis korekte diagnozita. Plej ofte oni kulpigas, ĉi tie ulcer-perforadon, tie pankreatiton, alie lezojn, ĉe maldika intesto, apendicitojn kaj, ĉe virinoj, rompiĝojn ĉe enuteraj gravedecoj, aŭ kistojn ĉe ovario. En multaj, kazoj, la kirurgia entranĉo devis esti aŭ plilarĝita aŭ refermita por alie refari alian.

Tamen tiu organo ne estas freŝdata malkovro. Claude Gallien. fama greka medicinisto kaj anatomiisto ĝin identigis kaj ĝin priskribis, jam en la 2-a jarcento antaŭ Kristo. Li rimarkis, ke lieno estas organo saturita per sango, kaj konkludis, ke ĝia rolo estas reguligi la sangan cirkuladon. Do, jam de longe, oni eksciis, ke rompiĝo de tiu rezervujo okazigas mortigan hemoragion kaj oni tion tre atentis.

En la 19-a jarcento la unuaj kirurgiistoj ekprovis savantajn eltrancojn de lieno, malgraŭ ĉiaj danĝeroj rilate ĉian operacion en tiu periodo. Oni elprenis la organon, oni ligis la sangajn angiojn, kiuj ĝin atingas, por, ĉiapreze, haltigi hemoragion.

Baldaŭ medicinistoj ekpensis, ke lieno estas alio ol fragila saketo en kiu sango akumuliĝas. D-ro Charles



Pavel (en Tenon-hospitalo, Parizo) la unua opiniis, ke tiu organo plenumas subtilajn funkciojn. Li observis, ke malsanuloj, kiuj mortis, post longa mistera malsano, montris, dum nekropsio lienon enorman, ŝvelintan kaj evidente malsanan, dum la aliaj organoj estis tute sanaj. Nur de unu jarcento, oni serioze studas lienon. Sed ĝi estas ankoraŭ tre malbone konata kaj restas mistera organo en nia korpo.

Ĉe dissekcado oni ekvidas brunan paketon ĉirkaŭ 200-grama. 12 cm longa, 8 cm-larĝa, eta saketo, kiun atingas kelkaj angioj.

Unua rimarko : tiu saketo estas malbone protektita : ĝia ŝeleto estas ekstreme fragila (tiel delikata, ke oni ne povas ĝin ripari kiam ĝi estas ŝirita) ; tial la suturoj faritaj de la kirurgistoj ne estas firmaj : la histo ŝiriĝas.

Interne, kion oni trovas ? unue dika arterio, kiu transportas la sangon venantan el koro ; ĉirkaŭe, kiel mufo, estas aglomeraĵo de blanketaj histoj el kiu senĉese defalas iaj blankaj limfocitoj, kiujn lieno produktas plej grand-nombre.

Envolvas la tuton ruĝa pulpo : ekzamenita pere de mikroskopo, tiu pulpo montras nur labirinton de etetaj angioj kaj kavetoj tra kiuj la sango malrapide cirkuladas. Konklude : lieno estas ruĝa spongo provizita de la kora pumpilo.

Dua rimarko : alia originaleco : kontraŭe al ĉiuj muskoloj kaj ĉiuj organoj, kiuj resendas al koro la sangon uzitan, lieno resendas la sian al hepato. Certe tiu organo havas gravan rolon, ĉar jam de la tria monato ĝi montriĝas ĉe la feto ; la serĉistoj malkovris, ke lieno, rilate produkton de ruĝaj globuloj, estas tre agema inter la tria kaj la sesa monato de la feta vivo. Iom post iom, ĝi transdonas tiujn funkciojn al la osta medolo kaj gardas nur produkton grand-kvantan de iaj specoj de blankaj globuloj : (limfocitoj, monocitoj, kaj tiuj fagocitoj tiel grandaj manĝantoj de mikroboj).

Kvankam lieno ne fabrikas ruĝajn globulojn, ĝi rolas pri ili, kiel « kovilo » Fakte la elementeroj, kiuj defalas de la osta medolo estas ruĝaj globuloj ankoraŭ ne perfektaj, kiujn oni nomas « retikulocitoj ». Post kontrolado kaj elfinado, fare de lieno, ili atingas « adoltan aĝon » kaj povas eniri en la sango-fluon.

Kiu sistemo organizas, estras, reguligas tiujn agadojn ? Mistero ! Kiel diras D-ro Hubert Piguet, P-ro en Parizo-Fakultato « Funkcioj de lieno estas diversaj kaj ne tute precizigitaj. Tamen kelkaj estas bone konataj..

Estas pruvite, ke lieno plenumas 25 % de hemolizo (hemolizo eligas el sango la maljuniĝintaj ruĝajn globulojn, kiuj vivas proksimume kvar monatojn). « Lieno estas vera tombejo por hematioj » diras la medicinistoj. Tiu detruo efektiviĝas laŭ ritmo de 10 milionoj en unu minuto. Sed plej atente lieno efektivigas tiun funkcion ; dum tiu detruo ĝi elprenas la feron entenatan en la maljunaj ruĝaj globuloj por ĝin redoni al la « infanoj », kiuj jus alvenis el melodo.

Timinda kaptilo por mikroboj ankaŭ estas lieno. La sanga cirkulado estas tre malrapida tra tiu labirinto de mikroskopaj kavetoj, korpuskloj, kordonoj, sinusoj. Fagocitoj, kiuj, po-milione, ĉi tie embuskiĝis, multkvante manĝegas bakteriojn : estas purigado plej grave necesa.

Ankaŭ ĝendarmo kontraŭ hemoragioj ĝi estas. Jen funkcio, kies mekanismo estas malbone konata de la medicina scienco : tamen plejparte ĝi efektiviĝas en lieno : estas produkto de anti-korpoj ; tiuj elementoj havas mision detrui, ĉie ajn, kie ĝi troviĝas, ĉian fremdan korpon (eĉ greftaĵon), kiu eniris en nian korpon.

La plej mistera funkcio de lieno rilatas aliajn konstituantojn de sango, ekstreme gravajn. Temas pri « plakeroj », t.e. eroj de dikaj ĉeloj faritaj de osta melodo kaj kiuj mezuras ĉirkaŭ 2-4 milonojn da milimetroj Okaze de vundo ĉe sanga angio, ili kuregas ĉe la breĉon kaj klopodas por ĝin luto-ŝtopi ; ili rolas, kiel veraj anti-hemoragiistoj ĉe la sango-fluo, en kiu ili naĝas po ĉirkaŭ 200.000 por unu kuba milimetro. Nu, estas lieno, kiu, distance, telekondukas eligon de tiuj « plaketoj » fare de medolo. Se, pro fortranĉo, lieno malaperas, oni tuj konstatas, ke tiuj sangaj « plaketoj » povas ekstravagance proliferi, ĝis post kelkaj tagoj, atingi 500.000 kaj eĉ 1 - 2 milionojn por unu kuba milimetro.

Kelkfoje, la medicinistoj plej malfacile haltigas, dank'al anti-koagulanto tiun danĝeran pletoron, kiu okazigas densigon de la sango.

Kiuj misteraj mesaĝoj lieno sendas al medolo ?

« Kiam ni tion scios, diras la specialistoj, ni estos irintaj grandan paŝon sur vojo al konservado de bona ekvilibro ĉe homa sango ».

Lieno ne estas etendebla : ĝi ne povas akumuli sangon por ĝin redoni, kiam estas necese. Lieno ŝvelas, kiam ĝi estas malsana, ĉu pro akcidento, ĉu pro virusoj aŭ bakterioj ; ambaŭ kazoj estas gravaj kaj ofte nekuraceblaj.

P-ro Bousser kaj D-ro Samama akceptis en sian sekcion junulinon, kiu plendis pri doloro ĉe flanko. Post longa demandaro ŝi memoris ke, antaŭ kelkaj semajnoj, okaze de plonĝo en naĝejon, ŝi falis horizontale. Ŝi ne atentis tiun okazaĵon sed ŝia lieno pro tio estis traumigita kaj ĝia eltranĉo montriĝis necesa.

Oni eĉ vidis virinon, kies lieno estis vundita de ŝia dormanta edzo, kiu. iom bruske, turniĝis en la lito, kaj ŝin ekfrapis per sia kubuto.

La praktikistoj faris eksperimentojn : sur paciento oni elprenas ruĝajn globulojn ; oni markas ilin per kromo-51 (radioaktiva izitopo). Oni ilin gardas dum kelkaj minutoj en temperaturo 56°, celante ilin difekti.

Poste oni ilin reinjektas en la sangan cirkuladon. Lieno sekestras tiujn nenormalajn globulojn en sia tuta maso. Sed se lieno ricevis « ŝokon », tiuj globuloj ne venas en tiun malsanan punkton. Radiado-komputiloj montras « truon », malhelan : lezo kaj ĝia graveco.

Ŝvelo de lieno povas ankaŭ esti reago kontraŭ atako de virusoj aŭ mikroboj ; tiukaze, analizo de sango estas necesa por identigi la atakanton : ĝi povas esti Eberth-bacilo, responsa je tifoida febro, tuberkulozo-bacilo, brucelozo-bakterioj, paludismo-viruso, kaj eĉ tropika bilharziozo.

La plej pereiga kaj plej disvastigata estas la paludisma viruso. Eĉ kiam oni detruas tiun viruson, lieno restas tiel fragila, ke ĝi povas rompiĝi nur kiam la resanigata malsanulo malsuprenkuras la ŝtuparon saltante.

Lieno havas siajn proprajn perturbojn, kiel Misformaĵo ĉe la ruĝaj globuloj Tiu malsano estis malkovrata kaj studata antaŭ ĉirkaŭ duon-jarcento, de du hematologiistoj : Minkovski — Chauffard. Ĉikaze la ruĝaj globuloj estas sferformaj anstataŭ esti plataj. Lieno tute ne akceptas tiujn fantaziulojn kaj ilin detruas. Konsekvence, osta medolo pliigas sian produktadon, kiu estas tuj eliminata de lieno. Tiu fenomeno povas esti tre grava ĉar la subjekto rapide anemiiĝas. Se estas infano ĝia kreskado kaj ĝia seksmatureco povas esti perturbataj. Eĉ morto povas minaci. Necesas plej rapide operacii. Post fortranĉo de lieno la malsanulo rapide revenas al normala vivo ; kvankam li daŭre kunportos sferformajn ruĝajn globulojn li povas normale vivi kaj eĉ fariĝi tre maljuna. Sed tiu anomalio estas hereda kaj la medicinisto devas kontroli la infanojn de tia malsanulo ; kaj oni povas vidi — diras D-ro Samama — en la sama ĉambro de hospitalo, la anojn de familio, kiuj suferis saman fortranĉon de lieno.

S. G.

El Lectures pour Tous (Nov. 1969).

Pri la problemoj solvendaj

KIO ĜI POVAS ESTI ? HAZARDA KONGRUO ? ARKANA ANTAÙVIDO ?

« Ni supozas, ke por la legantoj de nia revuo estos interese konatiĝi kun la eta eseo de Aleksandro Logvin, kiu ĝin verkis speciale por « Kulturaj Kajeroj », ankaŭ tradukis poemojn de N. Gumiljov kaj S. Jesenin el la rusa. Ni atendas resonojn. »

Ekzistas enigmoplenaj temoj, kiuj longe-longe ne trovas solvon. Tasko de mia eseo estas altiri atenton de la homoj, kiuj interesiĝas pri la samaj temoj kaj disponas analogiajn faktojn. Sro Babin volonte donacos ankoraŭ unu-du paĝetojn de sia bela revuo por la plua ekzamenado de la problemo.

Kiam oni estas senhelpaj ion supernaturan kompreni kaj ĝuste klarigi, oni komencas supozi, kio ĝi povas esti : klarvido ? antaŭsento ? hazarda renkontiĝo de l'cirkonstancoj ?

Pri klarvido ekzistas multaj faktoj. Kaj kvankam nun neniu povas malkovri ĝian devenon, fenomeno de la klarvido estas senduba. Permesu al mi prezenti nur unu ekzemplon, historie fiksitan.

Eminenta rusa scienculo Miĥajlov Lomonosov, estinte ekster sia patrolando, sonĝe vidis, kiel lia patro pereis akcidente sur la maro dum fiŝkaptado. Poste evidentiĝis plena analogio inter la sonĝo kaj la realo.

Pri antaŭsento ankaŭ preskaŭ ĉiu homo havas ekzemplojn el propra vivo. Mi volus citi freŝan kaj interesan rakonton de nuntempa rusa verkistino Galina Serebrjakova el ŝia kuracista praktiko.

« Foje, matene, helpkuracisto Zajĉik (diminutiva vorto de Zajac-Leporo, do, Leporeto) venis al mi neĝustatempe.

— Mortos mi baldaŭ, diris li firme.

— Ne, respondis mi. De kie vi tion prenis ?

— Ĉu sonĝo, ĉu fantomo estis ; tamen al mi ŝajnis, ke ni ambaŭ navigis en boato. Bordo abundis je florantaj arboj. Kiam ni proksimiĝis al la bordo, vi elsaltis sed mi restis en la boato, kiu estis pli kaj pli forportita de la bordo...

— Absurde, diris mi, evidente malfortiĝis viaj nervoj. Kaj piza kaĉo por vespermanĝo estas tro multpeza, ekridetis **mi.**

Sekvontan tagon, okupinte sin per damludo, Zajĉik malrapide malsuprenrampis al la planko. Lia vizaĝo iĝis malhelruĝa, ŝvelis. Li senkonsciiĝis. Du tagojn ni ĉiuj vane provis savi lin. Mortis Zajcev pro sangelfluo en cerbon. »

Do la antaŭsento, same kiel la klarvido, estas evidenta kaj science solvenda, sed, ve, dume ne solvita. Tamen jen ni venis al okazo, kiam ĉio estas plenplena de io transcenda kaj mistika. Certe ne tia estas nun tempo por ignori sciencan bazon kaj kredi al io supernatura. Sed faktoj estas faktoj. Kaj tial ni transiru al ili.

La 16an de marto 1938 okazis ia eta hejma festo. Inter miaj gastoj estis ankaŭ mia amiko, rusa poeto Aleksej Nedogorov. Oni legis poemojn, aŭskultis muzikon. Subite Aleksej petis folion de papero. Mi proponis al li mian notlibreton. Li per krajono improvize enskribis intiman poemon dediĉitan al mi. Sed ne ĝi estas plej grava. Frapanta estis P.S. « ... (daŭrigota) vidu « Pravda » de 13-3-48 ». Tiam tiu aldono ŝajnis nur ŝerco, kiu por Aleksej estis karaktera. Tamen nun antaŭ ni elmontriĝas fakto de nekredebla kongruo. Ja, tiu dato, enskribita antaŭ dek jarojn pli frue, poste iĝis la dato de lia tragedio : la poeto pereis rezulte de tramakcidento la 13-an de marto 1948.

Nevole oni primeditas despli se oni ekmemoras aliajn paralelojn de tiaj hazardaj renkontiĝoj de l'cirkonstancoj, kiuj iafoje transformiĝas en problemon de neordinaraj, eĉ eksterordinaraj fenomenoj. Sufiĉas rememori pri fatalaj kongruoj en sortoj de A. Puŝkin kaj lia lirika heroo Lenskij, de M. Lermontov kaj lia heroo Gruŝnickij.

Tamen plej fantaste nekredebla estas fakto, ke plene efektiviĝis post kelkaj jaroj tio, pri kio poetoj N. Gumiljov kaj S. Jesenin profete eldiris en siaj poemoj de arkana deveno.

NIKOLAJ GUMILJOV (1886-1921)

LABORISTO

Staras li ĉe inkandeska forno,
Etstatura homo olda jam.
Kun rigard' trankvila, tamen morna,
Kun palpebroj ruĝaj de inflam'.
Kamaradoj liaj dormas dise ;
Unu li ne dormas. Kun sever'
Li okupas sin pri kuglo-giso,
Kiu min disigos kun la ter'.
Finis li, kaj estas gaja homo.
Kaj revenas hejmen de l'uzin'.
Lin atendas en negranda domo
Varma kaj dormema la edzin'.
Kuglo, ĵus gisita, fajfos iam
Super ondoj de Dvina-river'.
Kuglo ĵus gisita trovos ĉiam
Bruston mian, indan por sufer'. (*)
Falos mi en lasta mort-angoro,
Ĉion mi ekvidos en la febr',
Kaj torente sango el la koro
Fluos al tretita polva herb'.
La Sinjor' kompensos min pro tuta
Vivo mia, plena de la trist'
Tion faris hom' en bluzo kruda,
Etstatura olda laborist'.

(*) Nekredeble tamen fama rusa poeto N. Gumiljov (estinta edzo de talenta poetino Anna Aĥmatova) en ĉi tiu poemo kvazaŭ antaŭsentis sian tragikan sorton. Li efektive pereis per kuglo, ĉar en 1921 li estis paf-mortigita.

SERGEJ JESENIN (1895-1925)

Sopiras mi en hejma rond'
Pri vasta kampo fagopira.
Mi lasu domon kaj foriru,
Kiel ŝtelist' kaj vagabond'.
Laŭvoje iru mi sen fin',
Mizerloĝejon ian trovos.
Amik' amata kontraŭ min
Tranĉilon akrigitan provos.
Per sun-printempa ilumin'
Ĉirkaŭvolvita flava vojo.
Kaj mia kara junulin'
Forpelos min de sia sojlo.
Revenos mi al patra dom'
Per fremda ĝoj' min konsoligos
Kaj dum vesper' de verda ton'
Mi sur maniko min pendigos. (*)
Salikoj grizfoliaj sin
Pli kareseme enakvigos.
Kaj nelavitan oni min
Sub hunda bojo enterigos.
Kaj luno flosos en la blu',
Ĵetante super lag' remilojn.
Rusio same vivos plu-
Danci kaj plori ĉe barilo.

(1915)

(*) La fenomena okazo ripetiĝas. Penso pri memmortigo eldirita de eminenta lirikisto de Rusio Sergej Jesenin en lia poemo, iĝis tragika realo en decembro 1925, kiam en leningrada hotelo « Angleter » la poeto mortis, pendiginte sin ĉe ŝnuro de valizo.

Silvestro la Arbarmastreto



En la Vogeza montaro, alte apud la monteĝa vojo, kuŝis iam, en vasta herboriĉa paŝtejo ĉirkaŭita de fago kaj abioarbaro, malgranda farmbieno, kies nomo estis « La Melisse ». Tra la domfenestroj oni ĝuis belegan vidaĵon al la ĉirkaŭaj montoj, al la fruktodona Rejnvalo, kaj pli malproksime al la montaro de la Nigra Arbaro, mirinde bela frumatene, kiam la unuaj radioj de la leviĝanta suno kronas gian eĝon. Iafoje oni ekvidis eĉ la neĝkovritajn Alpopintojn superstarantaj la orientaj Jurasmontoj.

Tie, vivis Petro, ses jara knabo, kun siaj gepatroj kaj Ludoviko, maljuna servisto.

Petro ne havis ludkamaradojn, ĉar en la proksimeco ne estis alia domo, kaj la vilaĝo kaŝiĝis profunde en la valo apud la rivereto. Tamen li neniam enuis, tiom da aĵoj estis malkovrotaj en la domo, en la subtegmentaj kameroj, en la grenejo kaj fojnejo.

La elektra kurento, kaj la gaso ankoraŭ ne estis konataj en tiu izolita bieno. Vespere, kiam la suno malaperis malantaŭ la montaro, oni ekbruligis lignofajron en la granda kameno de la kuirejo, oni sin lokis apude, maljuna Ludoviko ŝtopis sian pipon, kaj kutime diris al la knabo.

— Petro, rigardu ĉu la anĝeloj bone alkroĉis la stelojn kaj ekflamigis la lunon !

La knabon ĉiam plezurigis tia dirado, ĉar li sciis, ke poste Ludoviko rakontos al li historietojn pri la kapreoloj, la sciuroj, la birdoj, pri ĉiaj arbarbestoj, iafoje ankaŭ pri la feinoj aŭ la elfinoj. Li ankoraŭ instruis lin skulpti ŝipetojn el pinarbŝelo, fari pipetojn el glaningoj kaj glanoj, aŭ fajfilojn el lilako kaj sambuskotigoj.

Dumtage la knabo preferis vagadi tra la paŝtejo ĝis la arbarrando, kun Diko la luphundo, kiu ĉiam saltetis pro ĝojo ; Petro ŝatis aŭskulti la pepadon de la birdoj kaj la kveradon de la turtoj kiuj nestis sur kripliĝinta randfago.

Iun varman junitagon la knabo sola eniris pli profunde en la arbaron, li gaje petolis kaj galopis post flirtanta papiliono ĝis li sentis sin iom laca. Apud li staris giganta abio, kies radikoj formis sur la grundo kvazaŭ niĉojn ; ĉu eble estis kuŝejoj de leporoj aŭ de kapreoloj, kiuj ĉi tie trovis ŝirmon kontraŭ la ŝtormo aŭ la neĝventego ?

La knabo nestis sin inter du radikoj, aŭskultis la susuron de la vento en la foliaro, kiu sonis al liaj oreloj kiel dolĉa lulkanto, kaj ekdormis.

Subite li aŭdis voki nomon. Antaŭ li staris eta vireto, tute vestita en helverda silka tuniko, kun longa birdplumo sur la ĉapeleto.

— Ĉu estas vi kiu vokis min ? — demandis Petro.

— Jes, — respondis la vireto.

— Mi ne konas vin; kiu vi estas ?

— Mi estas Silvestro la tiea arbarmastreto. La homoj min ne konas ; mi montras min nur iafoje al la infanoj, al la bonkoraj infanoj, kaj tiam nur dum la tago de la somera solstico.

— Kio estas somera solstico — ?

— Estas tago plej longa en la jaro ; la suno estas plej alte en la ĉielo ; estas festotago por ĉiuj estaĵoj ; vi estas bonŝanca renkonti min. — Respondis la vireto.

Nun Petro aŭdis flustradon, ŝajnis al li, ke la abio parolas. La koro de la knabo batis ekscitite kaj li mirege rigardis la vireton. Tiu ĉi ridetis kaj kapjesis kaj aldonis.

— Jes, estas la abio, kiu parolis. La arboj, la floroj, la bestoj, ĉiuj kreitaj estaĵoj parolas lingvon, kiun vi Petro, hodiaŭ komprenos. Venu, mi volas de vi admirigi mian reĝlandon, la belan arbaron. — Kaj la vireto fajfis mallaŭte.

Alflugis granda tetraono, kiu per raŭka voĉo demandis.

— Ĉu vi bezonas min ?

Silvestre prezentis Petron kaj diris.

— Bonvolu transporti nin ĝis la dikaj kverkoj, mi petas.

— Surgrimpu — knaris la tetraono.

Apenaŭ ili sidlokis sin, brrrrrr..... la vivanta aviadilo plonĝis en la valon. Sub ili la arbfrondaroj preterŝoviĝis rapidege, malproksime la sunradioj kristale brilegis en la fluanta akvo de la riveretoj.

Ili alvenis en maljunan, maldensan arbaron, kaj alteriĝis ĉe majestaspekta kverko, kiu ŝajnis kvazaŭ reĝo de la ĉirkaŭaj arboj.

— Estu bonvenaj — diris la kverko — estas tre afable al vi mastreto viziti nin kun tiu bubeto.

Petro pli kaj pli mirigita kaj iomete ĉikanita respondis,

— Mi estas sesjara, mi estas granda knabo !

La kverko ridetis kaj respondis,

— Mi estas pli ol kvarcentjara ; mi vidis multajn homojn. Princoj kaj eĉ reĝoj ripozis sub mia frondaro, sed mi estas kontentega vidi vin. Jes, ja, vi estas granda, bonstatura knabo, kaj vi estas bonkora. La palumbo, kiu ofte observas vin de super la kripla fago raportis, ke vi faras nestojn, por la birdetojn, kaj alportis fojnon ĉe la arbarrando por nutri la kapreolojn vintre. Sed diru al mi, de kelka tempo mi ofte aŭdas terurigan bruon, la birdoj kaŝas sin en mia foliaro, kaj ombrego superflugas nin ; ĉu tio estas vivanta estaĵo ?

— Ne, — respondis Petro. — Estas senviva maŝino konstruita de la homoj, aviadilo oni nomas ĝin. Gi transportas homojn, paketojn, leterojn k.t.p. alilanden ; ĝis tiuj landoj, kie lumos la suno kiam ĝi jam subiris ĉe ni. Patro diras, ke ĝi estas nur danĝera kiam la homoj militas.

Nun preterkuris maljuna apro ; kolere li gruntis,

— La homoj enkadrigas nun siajn kampojn kaj herbejojn per dratoj elektraj ; oni apenaŭ frotas sian nazegon al tiu dratаĉo, Pan ! oni ricevas frapegon kaj oni ne vidas la frapulon. Tio kolerigas min.

— Estas la solulo, — flustris Silvestro, — li estas neniam kontenta, li eĉ ne akordiĝas kun siaj samspeculoj.

Per mansigno Silvestro alvokis nun cervon, kiu paŝtis ne tre malproksime kaj petis lin transporti ambaŭ ĝis la riverarbaro. — Volonte — respondis tiu ci afable ; mi ĵus intencis viziti miajn gekuzojn, ili ferias apud la rivero, — ekrajdu —. Kaj li klinis sian kapon por ke ili alkroĉiĝu al la kornaro.

Kiam ili dorsensidis, huiiiiii..... la cervo galopis tra la arbustaro, supersaltis la heĝojn kaj la barilojn, kaj rapidege ili alvenis en vastan arbaron. Tie ili renkontis ĉiajn gekonatojn : majestajn kverkojn, sveltajn fraksenojn, malhelfoliarajn fagojn, rondkapajn fraksenojn, acerojn sur kiuj aŭtune pendas flugilhavaj fruktoj, kies nomoj estas laŭloke : nazpinĉiloj, flugantaj anĝeloj, papilioj, k.t.p. Ili ankaŭ renkontis ĉiamverdajn pinojn kaj piceojn, kaj laŭlonge de la rivero : alnarojn. Oni ja scias, ke la elfinoj ŝatas ludi kaj danci en la nebulbenkoj de la alnejoj !

Ankaŭ la arbustoj estis variaj : avelujoj, sambukoj, blankaj dornarbetaĵoj, kies floroj — pensis Petro — avinjo kolektas ĉiujare por sia kortizano ; la dolĉodora kaprofolio, la erikoj, kies ruĝaj klošetoj gajigas la senarbaj lokoj, la bluaj mirtiloj, kaj kelkaj malfruaj konvaloj, sed precipe asperuloj odoraj, kies blankaj steletoj brilegas super la verticilformaj folioj. Multajn du — kaj kvarpiedulojn ili renkontis, plum — aŭ harkovritaj.

Jen aŭdiĝis frapado, Petro demandis,

— Ĉu estas homoj ci tie ?

— Estas ; ĉiam promenantoj en tiu arbaro, ĉar ĝi situas apud granda urbo, sed la frapado estas fa-

rata de la verda pego. Li senigas la arbojn, per sia beko fortika kaj pinta kiel bajoneto, de la danĝeraj ŝelinsektoj. Ni salutu lin.

Ili alproksimiĝis al la bruo, kaj Silvestro kriis,

— Bonan matenon verda pego, kiel vi fartas ?

Verda pego eksaltis de malantaŭ malsana pino kaj respondis,

— Tre bone, dankon, kaj vi afabla mastreto ? Kaj ankaŭ bonan matenon al vi ambaŭ. Ho ! Mi faras nur rapidan inspekton ĉi tie, la miksa arbaro ne ofte bezonas mian helpon, oni renkontas nur malmultajn malbonfarantojn en tiaj arbaroj. Ho ve ! Estas tute alie en la ruĝmonta arbaro. Tie la homoj forhakis la fagojn, acerojn, kaj la ceterajn folioarbojn, lasinte nur la piceojn kaj kelkajn pinojn. Ventego faligis piceojn, kies radikoj estis ne rezistkapablaj post la forhako de la folioarboj. Tuj la ŝelinsektoj instalis sin, tunelis la ŝelon kaj baston, demetis siajn ovojn el kiuj eloviĝis detruaj larvoj, kiuj formanĝis la kambiumon.

— Kio estas kambiumo ? — demandis Petro.

Kaj Silvestro eksplikis,

— La kambiumo estas tavolo de ĉeloj, kiuj per la sukceno sendita de la folioj, kapablas fabriki novan lignoringon ĉe ĝia interna flanko kaj ŝelon ĉe la ekstera. La arbo produktas unu ringon jare. Do se la insektlarvoj detruas la kambiumon, la sukceno ne povas plu cirkuli, kaj la arbo pereas. Oni povas kalkuli la aĝon de arbo, laŭ la nombro de la jarringoj sur la ŝtipo.

— Ĉu kelkaj el tiuj larvoj povas pereigi dikan piceon — ? Petro timige aldonis.

Ho ! ili estas ĉiam multnombraj — respondis verda pego, — Mi kalkulis po tri milionoj por ĉiu arbo, el tiuj fibestetoj. Feliĉe la nuna forstisto estas bravulo ; li helpas nin aktive, forhakante la falintajn kaj malsanajn piceojn rapide, tiel mi povas iomete ripozi kaj inspekti la aliajn arbarojn.

— Sekve vi havas tempon por senraŭpigi min, — kriis apuda kverko.

— Ne estas mia tasko, estas la laboro de la kukolo, de la rubekolo, flava motacelo, pirolo, najtingalo kaj de ĉiuj paseroj ; ilin helpas ankaŭ la formikoj. Mi havas sufiĉe da laboro kun la danĝeraj ŝelinsektoj.

Dume, la laŭtparolilo de la arbaro, la buntplumara garolo, diskonigis la novaĵon, ke Silvestro, la arbarmastreto alvenis kun amiko, Petro la eta montulo.

La arbaro resonis pri galopadoj, sur la musko kaj foliotapiŝo alkuris cervoj, kapreoloj, leporoj, kunikloj, sciuroj, vulpoj kaj aliaj kvarpieduloj. Flugilbruetado kaj pepado anoncis la alvenon de ĉiaj birdoj. Ĉiu deziris alveni unua por saluti la vizitantojn. Tutlaste alglitis, kiel eble rapide, ŝvitanta heliko dirante :

— Mi petas vian pardonon, mi iomete malfruas, sed mi devis lavi mian konkon.

— Sed kokcinelo, kiu sidis sur la konko diris al lia orelo, tamen sufiĉe laŭte por ke ĉiuj ĉeestantoj povus aŭdi :

— Ne estas bone mensogi, konfesu ke vi estas tro pigra por kuri pli rapide.

Ĉiuj ekridegis.

Ne ĉiuj ..... Eta fagido, tute nuda, korŝire ploris. Bela sinjorino forŝiris lian foliaron por fari bukedon. Ĉu ŝi ignoris, ke la foliaro estas samtempe la vestaĵo kaj la pulmo de la arbo ? La ĉeestantoj konsterniĝis.

— Povrulo, — diris Silvestro ; malrespektema persono, kiu preferas foliaron, baldaŭ velkontan, kaj kiun ŝi forĵetas ĉe la vojrando aŭ en la rubujon, ol etan vivantan arbidon, kies suferoj estas nun teruraj !

La homoj tro ofte estas malrespektemaj, grumblis dika fago. Ĉi tie venas miloj da homoj, piede aŭ per aŭtomobilo, kiel ili nomas tiun veturilon senĉevalan. Ili vundas nian ŝelon, premegas aŭ rompas niajn idojn ; kial ili ne lasas la veturilon sur la vojo ?

Jen dismovo okazis inter la arbarbestoj ; Kapreolo sciigis ke la pasintan semajnon vaganta hundo mordis lian idon, li ankoraŭ ne resaniĝas, li apenaŭ povas marŝi.

— Hi ! hi ! hi ! ploretis kunikleto, tiu fihundo mortmordis mian patrinon.

Sciuro kaŝanta en branĉa disforko aldonis :

— Knaboj ĉiam jetas al mi ŝtonojn per ŝtonĵetilo.

Tiam altkreska kverko parolis :

— Rigardu mian trunkon, ĝi estas tute kava ; antaŭ kelkaj jaroj aro da gejunuloj kampis tie kaj ekbruligis fajron, ili dancis ĉirkaŭe, tio estis amuzega, sed la varmo hejtis mian ŝelon kaj detruis la kambiumon, poste la ŝelo falis ; la fungoj, tiaj malbonaj mikroboj putrigis la lignon ; mi suferis kaj ankoraŭ suferas multe. Mi estis bela rektekreskanta arbo ; mia ligno estis unukvalita por la ŝipkonstruo, mi revis pri belaj malproksimaj landoj : pri Ameriko Ĉinio, la Norda Poluso, kaj nun mi timas, ke vento faligos min teren, kaj mi mortos mizere, senutile.

— Ĉu la homoj estas ĉiuj krimuloj ? — elbabilis maltima rubuso.

— Ili disĵetas en miaj brakoj ĉiajn difektajn objektojn : Karoseriaĉojn, kaserolojn, meblojn, grasajn paperaĵojn, pu ! kia malodoro ;

— Ĉu la arbaro estas nuntempe la rubejo de la civitoj ? Iam la promenantoj estis pli puremaj.

Rapidfluge alvenis buteo ; li aŭskultis la plendaĵojn kaj post momento li diris :

— Mi revenas el la Alpoj, tie mi vidis teruregan spektaklon ; la neĝo amasiĝis sur la montoj, iun tagon pluvis kaj samtempe la Foeno blovis.

— Kio estas Foeno ? demandis Petro.

— La foeno — respondis la buteo — estas varma vento, kiu venas el Italujo ; disfandas la neĝon, ofte tro rapide. Ĉifoje la neĝo glitis, ĝi fariĝis lavango, terura lavango, kiu malsupren detruis kabanojn, vilaĝojn, mortigis homojn kaj bestojn.

— Ne forgesu la terŝoviĝoj, — aldonis bluparuo, kiu eliris el trueto.

— Kaj la inundo de la longvalo, pepis regolo.

— Ĉio tio estas la konsekvenco de la ekstermiĝo de la arbaroj sur la montoj — knaris granda nigra kornikо ; kutime la arboj per sia branĉaro, siaj trunkoj kaj radikoj bremsas la falintajn gutojn, ili penetras malrapide en la grundon kaj provizas la fontoj malsupre en la valoj. Kiam la arbaro mankas, la grundo malmoliĝas, la pluvgutoj glitas laŭlonge de la deklivo, amasiĝas, kaj alvenas rapidege en la valoj kaj kreas inundon. Poste la fontoj sekiĝas, dum la grundo sur la montoj fariĝas senfrukta.

— Ĉu nian domon minacas lavango ? demandis Petro.

Ne Petro, — respondis Silvestro — viaj gepatroj varŝas la arbaron. Mi vidas ilin ĉiujare helpi la arbariston malkovri la arbidojn de la sufokantaj fiplantoj. Cetere la abio — kaj fagoarbaro tre bone ŝirmas vian bienon.

Subite oni aŭdis zumadon ; estis abelreĝino, kiu preterflugis kun sia svarmo, kaj salutis la arbarmastreton.

Silvestro fiksis nun kverkbranĉeton : tri folietojn kun du mirinde belaj glanetoj, ĉe la kaskedo de Petro. Ĉiuj ĉeestantoj : arboj, floroj, bestoj aplaŭdis, ĝojkriis ; la kampanulo sonorigis siajn cejanbluajn klošetojn ; la Luzuloj klinis siajn kapetojn ; sed la ranunkolo ŝajnis ĵaluza, ĉar ŝi fariĝis iom pli flava. La violo klinis modeste sian kapon, ŝi aprobis la elekton, sed pensis en si : Ha ! se Petro estus knabino, eble, Silvestro elektus min.

Malfruas — diris Petro, — estas tempo hejmeniri.

Du palumboj proponis rekonduki ilin ĝis la dika abio. Ili traflugis la ebenaĵon, kaj la vitejon, kiu kreskas sur la montetaj deklivoj ĝis la Kaŝtanarbejo. Ili ripozis iomete sur dika pino, kies šosaro, de malproksime en la lastaj radioj de la subiranta suno, lumis kiel kristnaska arbeto.

Poste ili enflugis la abiejon.

Ho ! kiom malvarmeta estis sub la kolonoj vicigitaj kiel soldatoj dum parado. Ili salutis Silvestron, li estas ja ilia mastreto ; kaj ili invitis Petron baldaŭ reveni.

Fine ili alvenis ĉe la granda abio de kie ili foriris matene. Silvestro admonis Petron esti ĉiam bona al ĉiuj de Dio kreitaj estaĵoj.

— La arboj, la floroj, la bestoj, kaj precipe la birdkantoj memorigas al vi ĉiam la Amon senfinan de Dio ; sufiĉas halti kaj iom mediti pri la homa destino.

Kaj Petro vekiĝis.

Apud li staris lia patrino kun Diko la luphundo, lia fidela ludkamarado. Ili serĉis lin ekde momento. Petro rakontis sian promenadon kun Silvestro, la arbarmastreto. Li sciigis, ke la arboj la floroj kaj ĉiuj bestoj parolis lingvon kiun li, Petro, komprenis bonege.

La patrino ridetis dolĉe, ŝi pensis, ke ŝia knabeto faris belegan sonĝon. Tamen ŝi miris pri la stranga kverkbranĉeto kun la mirinde belaj glanetoj, ĉar ne kreskis kverko sur tiu altaĵo, kaj ankoraŭ ne estis la sezono de la glanoj.

J. KRAEMER.

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

Tiuj du problemoj estas la lastaj de nia konkurso 1969-70. Ni petas vin, ke vi sendu viajn solvojn, kiel eble frue al

S-ro P. Chevalier
19, Boul. G.-Lauriol F. 44 - NANTES

Se vi ankoraŭ ne sendis la solvojn de la antaŭaj problemoj (la konkurso entenas entute 4 × 2 problemojn), vi povas sendi ilin ĝis la fino de Junio.

UNUA PROBLEMO. — (20 poentoj)

En la ĉi subaj frazoj bonvolu anstataŭigi la punktojn per la taŭgaj vortoj. Estos kalkulitaj po 2 poentoj por ĉiu vorto ĝuste eltrovita, sed estos forprenita po 1 poento por ĉiu vorto malĝuste eltrovita.

1 — Kontraŭ min mem ..... turnis mia ruzo.

2 — Cikado troviĝis senproviza ..... l'veno de l'malvarmo.

3 — Mi fariĝas saĝa ..... mia propra kostopago.

4 — Oni povas pagi ..... poŝtmarkoj.

5 — ..... sufero venas prospero.

6 — Li havas ..... sesdek jarojn.

7 — ..... malfrua gasto restas nur osto.

8 — Li promesis reveni al ni akurate ..... la oka horo.

9 — Kuraĝon mi havas sufiĉe ..... iri nupiede ..... la mezon de la infero.

DUA PROBLEMO. — (10 poentoj)

LITERA ENIGMO

1 — plastro
2 — teatro
3 — harpo
4 — putoro
5 — pipro
6 — prunto
7 — kurado
8 — grado
9 — kaliko
10 — heroldo
11 — koloro
12 — majstro
13 — ekrano
14 — pastro
15 — oferti
16 — korano
17 — nukso
18 — lunĉo
19 — procesio
20 — kareso
21 — kampo
22 — gripo
23 — barilo
24 — kanajlo
25 — palaco
26 — kanjono

Elprenu el ĉiu supra vorto unu literon tiel, ke la restintaj literoj, lasitaj en siaj antaŭaj lokoj, formunovan vorton. La elprenitaj 26 literoj en la numerita vico prezentos agrablan, konstaton en la franca literaturo pri unu el la popoloj de Okcident-Eŭropo.


AMUZAJ PROBLEMOJ
(apartaj de la konkurso)

La patrino de la simio — ŝnuro pendis ambaŭflanke de pulio ; ĉe unu ekstremo estis alligita pezilo kaj ĉe la alia ekstremo simio sampeza. Ĉiu futo de la ŝnuro pezas kvar uncojn ; la aĝo de la simio plus la aĝo de la patrino egalvaloras kvar jarojn ; la pezo de la simio estas tiom da pundoj, kiom da jaroj estas la aĝo de la patrino ; la patrino estis duoble pli aĝa ol la simio estis kiam la patrino havis la duonon de la aĝo, kiun la simio havos, kiam li estos trifoje pli aĝa ol la patrino estis, kiam ŝi estis trifoje pli aĝa ol la simio. La pezo de la pezilo kaj la pezo de la ŝnuro estis la duono de la diferenco inter la pezo de la pezilo kaj la pezo de la pezilo kaj la pezo de la simio. Kiom longa estis la ŝnuro ?

La koloraj ovoj. — Patro preparis dudek kvar Paskajn Ovojn por siaj tri filoj. Ok estis bluaj kaj entenis po kvin frankoj ; ok estis ruĝaj kun po tri frankoj ; ok estis flavaj kun po unu franko. Ĉiu knabo trovis trikoloran linion el ok ovoj sur la tablo kaj ĉiu el ili ricevis la saman sumon. Kiamaniere la patro disdonis la ovojn ?

NOVA ENIGMO

S-ro Gajulo jam de longe prizorgas la aleojn de la parko. Li trovis la eblecon fari sian laboron sen devigo dufoje iri la saman vojon. Por tio li povas komenci ĉe punkto 7 aŭ 8. Kiuj estas la solvoj ?




GRAMATIKO PER BONHUMORO

« **Ĉu ... ĉu** : uzota en senco demanda ; ankaŭ en la senco de necerteco aŭ de dubo.

jen ... jen : signifas « iufoje ... alifoje ».

aŭ ... aŭ : montras alternativon ».



— Aŭ vi pagas al mi tiun katpeltan ĉapelon, aŭ vi ne plu havos edzinon.



— Li ne povis decidiĝi, ĉu legi, ĉu manĝi.



— Mi povos jen rigardi la eksteron, jen akcepti la eksteron ĉe mi.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (45 aŭstr. ŝil.).
Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (85 fr.).
Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127, Midford Rd, Combe Down, BATH BA2 5Rx (15 ŝil.).
Ĉeĥoslovakio : S-ro Dezidero Koronczi, Nabrezie Metoda 1707/16, PRIEDVIDZA (2 us. dol).
Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE.
Finnlando : S-ro Joel Vilkki, SOMERO 9 - Pĉk. : Tu 60253 (9 mk.).
Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk. Frankfurt (M) 234-759 (6,2 mk.).
Hispanujo : S-ino Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1°, la, BARCELONO (110 pes.).
Italujo : Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO (1.000 lir.).
Japanujo : S-ro Tara Niŝiumi, 6-31-19 Kita-Koiwa Edogawa-Ku, 133, TOKIO - pĉ Tokio 44163 (640 jenoj).
Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (1520 d.).
Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL, ZH pĉk. 209721 (7 guld.).
Norvegujo : S-ino Marit Delor, Solveïen 143-B, LJAN.
Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (60 zl.).
Rumanio : S-ro Adrian Boldan, p.k. 1412, BUKUREŜTI - 6. (27 lei).
Svedujo : S-ro Roland Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö pĉk 157007 (10 kr.).
Svislando : S-ino H. Chavan, rue Etraz 16, LAUSANNE (7 sv. fr.).
Tajlando : S-ro C.L. Unchitti, GPO box 1231, BANGKOK (2 us. dol.).
Usono : S-ro D.W. Hoffman, 1444 Leslie Street, HILLSIDE (N.J.) (2 dol.).
Aliaj landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (20 st.) aŭ respondkuponoj (12 respk.), per libroj aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al la Direktoro.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 2 de 1970, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

L'Assemblée générale, dont vous trouverez le compte rendu dans ces feuilles, a approuvé l'activité du Conseil d'administration pendant l'année 1969. Elle a, d'autre part, pris quelques décisions importantes dont vous pourrez prendre connaissance. Parmi les propositions ou remarques intéressantes faites par quelques membres je voudrais en développer deux plus particulièrement.

La vie en communauté pose des problèmes et chaque membre de cette communauté doit accepter de petites restrictions à sa propre liberté s'il veut que les autres n'y portent pas des atteintes plus grandes en agissant comme eux-mêmes désireraient le faire. Mais ces restrictions ne peuvent être imposées. La direction de stage ne peut intervenir que dans les domaines essentiels, pensant qu'il est naturel à des esperantistes de respecter les autres esperantistes, eux dont l'idéal doit être le respect de l'homme. Car c'est de respect qu'il s'agit, non pas de tel ou tel qui semble attirer la considération, mais de tous. Que coûterait-il à un esperantiste de s'abstenir de faire du bruit dans les couloirs le soir, de fumer à table, de jeter des papiers par terre, de maltraiter les objets, les fleurs, les arbres ? C'est d'ailleurs l'attitude de la grande majorité. Il suffirait que ce soit celle de tous.

Le deuxième point n'est pas nouveau. A certains stages, la volonté de parler en esperanto est insuffisante. C'est vrai et je suis le premier à le déplorer. Mais à celà il y a deux raisons complémentaires. D'abord le but de la M.C.E. n'est pas seulement de fournir à de bons espérantistes une occasion de rencontrer d'autres bons espérantistes pour pratiquer une langue qui n'a plus de secret pour eux. D'ailleurs cela est toujours possible. La M.C.E. forme de nouveaux espérantistes qui, au départ ne savent pas un mot de la langue et ne peuvent converser qu'en français. Devons-nous d'autre part refuser une famille dont seulement un ou deux membres parlent l'esperanto. Il semble que le nombre de bons espérantistes formés à Grésillon — la Commission des examens de l'Institut français d'Esperanto peut l'attester — est assez considérable pour prouver que les méthodes grésillonnaises ne sont pas tellement mauvaises. La seconde raison est qu'il serait difficile d'obtenir que les débutants parlent l'esperanto, si ceux qui peuvent les y aider, les bons espérantistes, n'étaient pas là pour donner l'ambiance. Il faut que les « lertuloj » viennent nombreux à tous les stages, non seulement pour satisfaire leur désir de rencontrer des amis qui soient eux aussi des « lertuloj », mais aussi pour montrer que pour eux l'esperanto n'est pas uniquement un outil personnel qu'ils savent bien manier. Ils ont un grand rôle à jouer s'ils se rendent compte que c'est par eux que passe le développement de l'esperanto. Il leur faudrait pour cela accepter de provoquer les « balbutantojn », d'avoir des « conversations » parfois très limitées qui ne leur apporteront rien d'autre que la joie d'avoir aidé les autres et l'esperanto. Qu'ils y pensent. Les responsables pris par l'organisation ne suffisent pas à la tâche. Ils ne peuvent que dispenser « le savoir » à heures fixes, dans les limites d'un nécessaire programme préétabli. Ils ne peuvent pas être à la fois au bureau, au salon, dans les couloirs, à la piscine et dans le parc. Mais vous, « lertuloj », vous le pouvez.

P. BABIN.

PHILATHELIE

Nous avons toujours de très belles séries de timbres de Roumanie à vendre avec une réduction de 50 % sur les prix du catalogue Yvert et Telier.
Adressez 10, 20, 30 F. à :

M. GILOTEAUX
3, allée Béranger — 59 - Croix

NOS JOIES

Nous avons appris avec plaisir le mariage de Annie Bargeot avec Michel Bernard, à Nevers.

Tous nos vœux de bonheur à tous deux.

LA REVUE

Merci à tous ceux qui ont réglé leur abonnement. Le nombre d'abonnements bienfaiteurs est en augmentation. Certains abonnés ont même envoyé un complément après l'annonce de l'augmentation. De nouveaux amis ont envoyé leur abonnement. L'effort doit se poursuivre. Merci d'avance.

J. Cheverry (49)	15,00
S. Salmon (49)	15,00
G. Ciret (37)	15,00
J. Schrapp (Allemagne Fédérale)	15,00
J. Hibon (92)	15,00
Mac Lennan (Angleterre)	15,00
B. Clavier (69)	15,00
J. Selle (75)	15,00
S. Suziki (Japon)	15,00
A. Jakubec (Tchécoslovaquie)	15,00
H. Liebelt (Allemagne DDR)	15,00
G. Günther (Hongrie)	15,00
Z. Seidler (Tchécoslovaquie)	15,00
S. Tamaka (Japon)	15,00
G. Massé (73)	15,00
J. Carré (69)	15,00
J. Decobert (59)	15,00
Laga ESp Stelo (13)	15,00
E. Saito (Japon)	15,00
E. Macé (76)	15,00
L. Richerataux (67)	15,00
H. Habermehl (67)	15,00
C. Langronnier (66)	15,00
J. Minani (69)	15,00
T.S. Kho (Pays-Bas)	25,00
P. Turbellier (44)	15,00
E. Robin (92)	15,00
M. Hedelin (75)	15,00
P. Askolovitch (75)	15,00
G. Daems (Belgique)	15,00
M. Daems (Belgique)	15,00
R. Doury (75)	50,00
J. Berthelot (44)	15,00
M. Hubert (49)	15,00
C. Bouquin (59)	15,00
G. Jelenc (86)	15,00
J. Asao (Japon)	15,00
E. Fleijs (U.R.S.S.)	15,00
E. Moulin (95)	15,00
M.T. Valantin (18)	30,00
M. Stendahl (Danemark)	15,00
P. Jacquesson (72)	15,00
Total :	**690,00**

Assemblée Générale du Dimanche 22 Mars 1970

L'assemblée générale a été ouverte le dimanche 22 mars 1970 sous la présidence de M. Boyet, à 10 h.

Etaient présents : MM. et Mmes Babin, Bodereau, Cheverry, Ciret, Coussé, Dairon, Friedlander, Gonin, Guillaume, Guillot, Jacquesson F., Jacquesson P., Jelenc, Levrard, Lefevre, Mathé, Métivier, Micard, Pallard, Prévost.

Se sont excusés : MM. et Mmes Berthelot, Chevalier, Philippeau, Vazon.

Après la lecture du compte d'exploitation, M. Babin donne quelques explications. Il souligne en particulier que dans la rubrique propagande figurent 1 000 francs qui ont été versés au compte de Kulturaj Kajeroj afin de compenser le déficit de cette revue dont la parution permet, entre autres, de publier les programmes de Grésillon.

Il est ensuite discuté du bilan au 31-12-69. Au cours de cette discussion, M. Babin donne lecture d'une lettre de M. Contard qui propose une réévaluation des actions de Grésillon, compte tenu de la dévaluation du franc depuis la création de la maison. La forme coopérative de l'association (loi 1917) ne permet pas une telle réévaluation. Il faudrait que chaque actionnaire verse la différence entre la valeur ancienne et la valeur actuelle de la part d'actionnaire.

Quitus ayant été donné par les commissaires aux comptes, MM. Berthelot, Cheverry et Prévost, il est alors procédé au vote concernant le rapport financier. Celui-ci est approuvé par l'assemblée générale à l'unanimité des membres présents et représentés. Ceux-ci étant au nombre de 185 correspondant à un capital social de 41 300 francs, le quorum est largement dépassé.

La 1re résolution enregistrant le départ de 3 sociétaires et l'arrivée de 7 nouveaux sociétaires portant le nombre de sociétaires à 334 pour un capital social de 76 320 francs, est adoptée à l'unanimité.

L'ordre du jour appelle ensuite la discussion du rapport d'activité. Mme Cheverry donne alors lecture d'une lettre de Mlle Jeanne Dedieu qui regrette que les rapports des assemblées générales ne soient envoyés à tous les sociétaires. Il est rappelé que les statuts de l'association, acceptés par les personnes qui prennent une action, ne prévoient l'envoi que du seul rapport d'activité accompagné du bilan et du compte d'exploitation. D'autre part, le rapport de l'assemblée généralle ne paraît dans la revue Kulturaj Kajeroj qu'au titre de publicité pour Grésillon, cette revue paraissant de façon tout à fait indépendante. Le rapport d'activité est alors adopté à l'unanimité moins une voix contre.

L'assemblée générale doit ensuite pourvoir au renouvellement de la moitié des membres du conseil d'administration, et au remplacement de M. R. Jacquesson décédé, et de M. Gerrier démissionnaire. Les membres sortants sont : M. Babin, Mme Cheverry, MM. Chevalier, Ciret, Coussé, Guillot J.-P. Les membres sortants sont tous réélus et Mme E.-L. Mathé et M. Dairon sont élus aux postes vacants, à l'unanimité moins 8 abstentions.

Mme J. Jacquesson, MM. Berthelot, Cheverry, Prévost sont élus commissaires aux comptes pour l'année 1970.

Mise au point des stages

9e Semaine Culturelle

La partie culturelle incombe à MM. Boyet et Thierry. M. et Mme Jelenc s'occuperont de la partie administrative. Ce stage comportera environ 50 personnes. Il semblerait souhaitable que, dans l'avenir, l'organisation et surtout la propagande pour ce stage incombent exclusivement à l'U.F.E. afin d'éviter tout malentendu.

Cours et conversation

Ce stage aura lieu du 29 mars au 4 avril et sera dirigé par M. Ribot. M. et Mme Cheverry s'occuperont du château pendant cette période.

Passages

Un certain nombre de passages sont déjà prévus entre les vacances de Pâques et juillet :

— 27-28 avril : Ponts et Chaussées du Maine-et-Loire, assuré par M. et Mme Ciret et M. et Mme Cheverry.

— 3 mai : Congrès fédéral.

— 15-19 mai : Universités Populaires, assuré par M. et Mme Ciret.

— 20-21 juin : Association, assuré par M. et Mme Guillot.

— 28 juin : Conseil d'administration.

Stage pour responsables de cours ou de groupes

Ce stage, organisé par Mme Vincent, aura lieu du 28 juin au 12 juillet. M. et Mme Cheverry s'occuperont de la partie matérielle de ce séjour.

Vacances internationales culturelles et espérantistes

Ce stage couvrant la période du 12 au 26 juillet sera consacré à l'art dramatique grâce à M. Thierry et à la confection de marionnettes grâce à M. Perseke. M. et Mme Guillot assureront la partie matérielle de ce séjour.

Etudes espérantistes

Cette période de cours qui durera du 26 juillet au 9 août sera dirigée par M. Ribot pour la partie culturelle, et par M. et Mme Cheverry pour la partie matérielle.

Semaines espérantistes et culturelles

Pendant ce stage, qui durera du 9 août au 30 août, les cours seront assurés par M. Ligot, pour le 1er degré, par M. Le Magadur, pour le 2e degré, et par M. Babin, pour le 3e degré et la préparation au Pedagogia Atesto. Les activités de reliure et de vannerie seront dirigées par M. et Mme Dairon et cette année une activité de réalisation d'émaux sera dirigée par F. Lenel. M. et Mme Babin s'occuperont de l'administration de la maison pendant cette période.

Séjours de repos en septembre
Garde et entretien de la propriété

M. Babin fait l'historique des problèmes rencontrés au cours de l'année pour résoudre cette question : Au départ de M. et Mme Ludin, M. Lelièvre s'est proposé pour faire l'entretien de la propriété. Il a donc été embauché pour faire les travaux sans loger au château. Au cours du mois de novembre, M. Lelièvre a trouvé un emploi plus intéressant et a donc cessé son travail à Grésillon.

Un autre jardinier n'a été trouvé qu'au mois de mars, grâce à un membre du groupe espérantiste de Baugé. Il sera embauché à l'essai jusqu'au mois de septembre. En effet, cette solution d'un jardinier chargé uniquement de l'entretien de la propriété ne résout pas le problème du nettoyage du château avant les stages et de la préparation des repas au cours des passages.

Affaires diverses

M. Friedlander fait un certain nombre de propositions concernant la vie au château pendant les stages :

— Il serait souhaitable de rappeler aux stagiaires au début de chaque période d'éviter de dégrader la propriété en jetant des papiers ou en cassant des arbres.

— Il faudrait aussi que les stagiaires se trouvent le moins souvent possible dans le bureau et la cuisine afin de ne pas gêner les personnes chargées de la bonne marche de la maison.

— M. Friedlander demande que l'on s'abstienne de fumer dans les salles à manger pendant les repas.

— Il demande enfin que l'Esperanto soit employé plus systématiquement à Grésillon, tant à table qu'au cours de conversations qui devraient se faire en petits groupes.

Les membres présents pensent qu'il n'est pas possible de résoudre ces problèmes par des règlements ou affiches sans détruire un peu de l'atmosphère familiale de Grésillon. Il est cependant possible de rappeler à chacun de gêner le moins possible les autres stagiaires.

Quant à l'emploi de l'Esperanto, il est rappelé que les bons espérantistes devraient venir plus souvent à Grésillon afin de faire profiter de leurs connaissances les débutants qui sont nécessairement très nombreux au château pendant les stages.

M. Babin fait l'histoire de l'installation de la nouvelle cuisine qui n'est, d'ailleurs, pas tout à fait terminée.

Il demande à M. P. Jacquesson de dresser un plan des dépendances du château en vue de réaliser éventuellement d'autres chambres dans cette partie de la propriété.

Un plan de l'installation d'eau a également été demandé à M. Guillet.

Il est décidé que le motoculteur qui occasionne des frais très importants d'assurances et de réparations sera vendu.

M. Babin signale qu'il faudra refaire les tracts de publicité dont le stock est épuisé. Il est décidé de profiter de cette occasion pour moderniser la présentation de ce tract.

Le stock de papier à lettre et d'enveloppes étant également épuisé, un stock de présentation un peu différente est commandé.

M. Ciret informe qu'il continuera la construction du golfe miniature dès que le temps le permettra.

La séance est levée à 17 heures.

CONSEIL D'ADMINISTRATION

A l'issue de l'assemblée générale, les membres du conseil d'administration se sont réunis afin d'élire le bureau et de désigner les personnes habilitées à signer les chèques de l'association.

Le bureau élu est le suivant :

Président : M. Babin.
Vice-présidente : Mme Cheverry.
Trésorier : M. Coussé.
Trésorier adjoint : M. Chevalier.
Secrétaire : M. Guillot.
Secrétaire adjoint : M. Jelenc.

Le Secrétaire : J.-P. Guillot.

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude

Vos dictionnaires

Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie.

Adresser commandes et chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
49 - Baugé
C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de **5 Fr.**

Demandez notre catalogue.

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon : noires :	0,40 F.
couleur :	0,50 F.
Cuillères de collection : 9,00 et	12,00 F.
Pendentifs :	7,00 F.
Disques de stationnement :	3,00 F.
Etoiles pour vitres de voitures :	1,00 F.
Disque 30 cm avec chansons de Bob Dylan interprétées par le Duo Espera :	28,00 F.

et :

Les Héros Existentialistes

(texte français-esperanto)

de Colette Llech-Walter : 3,00 F.

(plus frais d'envoi pour commande au-dessous de 5,00 F.).

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ

de **P. Babin**

Prix : **8,50 F.**

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 50,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 30,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.